

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komerco“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa  
W. M. Page, adv., Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Paris  
Gili Noria, komercisto,  
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,  
București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrikkaj  
direktoro, Kaunas.

N-o 159  
30. 9. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
Zanoni (literaturo)  
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)  
Esperanto Triumfonta  
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifen

vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimena kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Sukceso en la Polica Kongreso en Wien.

La Deksesa en Sofia oficiale akceptita de la Bulgara Ministeria Konsilantaro.

En multaj medioj Esperanto estas necesega helpilo. Sed en neniu fako ĝia neceseco estas tiel evidenta, kiel en tiu de la polico. Jam en la ordinara polica servo ĝi estas utila. Al la trafikordiga policisto en la grandurboj ĝi ebligas facilan interkompreniĝon kun eksterlandanoj, parolantaj Esperanton. Tial tre laŭcele en aro da urboj deĵoras je gravaj trafik-centroj inter policistoj, parolantaj fremdajn lingvojn, ankaŭ tial, kiuj scipovas Esperanton, kiel en Chemnitz, Hago, Leipzig, Lisboa, Madrid, Nürnberg, Paris, Praha ktp. Esperanto akcelas la komunikiĝon en la servo de la administracioj por serĉoj kaj informoj. Nepra necesega ĝi tamen estas en la kriminala fako. En la epoko de la senfadenaj telegrafo kaj telefono kaj de la aeroplano la plej gravajn malhelpojn en la polica sfero kaŭzas la multlingveco.

Ne surprizigas do, ke celkonsciaj samideanoj policistoj klopodadas enkonduki Esperanton en la polican servon. Plej bonan okazon ebligis pri tio la ĵus okazinta Internacia Polica Kongreso en Wien.

Ni publikigas resuman raporton pri la preparado en la enkonduko de Esperanto en tiun fakon kaj rekomendas al la koncernaj interesatoj la nepran atenton de la ankoraŭ farota laboro.

Redakcio de ET.

### Raporto de la Direktoro de la Esperantista „Tutmonda Polica Ligo“.

En Wien okazis ĵus la unua eŭropa internacia kongreso de policaĵo ĉefoj.

La subskribinto ĉeestis tiun ĉi kongreson, delegita de la „Tutmonda Polica Ligo“, kies unua mondkongreso okazis en Nürnberg de l' 30. julio ĝis 1. aŭgusto antaŭ nia Dekkvinna.

Inter multaj problemoj pritraktitaj en la ampleksa tagordo ankaŭ la problemoj de la Internacia helplingvo trovis ĝeneralan atenton.

Nur modesta preparo kaj nesufiĉa informiteco de la koncernaj rondoj ne ebligis jaman akcepton de Esperanto per tiu ĉi kongreso. Pro tio la subskribinta delegito fine proponis submeti Esperanton al speciala komisiono, kies tasko estu la esploro de Esperanto laŭ taŭgeco kaj apliklebleco kiel oficiala internacia interrilata lingvo.

Post detala diskutado, eĉ akcelata per antaŭaj kontraŭuloj de la ideo, la propono estas akceptita per granda plimulto. Pro propagandaj celoj la propono estas ripetita en Esperanto kaj laŭ postulo de la estraro ankaŭ enskribita en la protokolon kun Esperanto-traduko.

La aludita problemoj vekis tiom grandan intereson, ke la subskribinto ricevis invitojn por propagand-paroladoj en 5 landoj, post ne longe tarotoj.

La venontjara kongreso de la Esperantista Polica Ligo okazos ĵus antaŭ la dua polica kongreso en Wien. Dependas do de la laŭcela laboro de la Esperantistoj ĝis tiam tiel prepari la kampon, ke fina akcepto de Esperanto kiel oficiala helplingvo efektiviĝos dum tiu dua kongreso en Wien. Oni bone komprenos, ke, se tiel serioza kaj grandega korporacio, kiel la policistaro, akceptos Esperanton, ni multon atingis!

Dezirinda ankaŭ estas konsekvence, ke ĉiu aktiva kaj serioza propagandisto, ĉiu grupo, societo aŭ klubo kiel plej eble turnu sian intereson al la akcelo de tiu gravega afero.

Bezonata estas:

1. ke en kiom plej eble multaj ĵurnaloj kaj en ĉiuj lingvoj oni ripete publikigos ĉi tiun ĝojigan sukceson;
2. ke en kiom plej eble multaj urboj kaj speciale en la grandurboj pli intense sentantaj la ling-

La Bulgara Esperanto Societo en Sofia sciigas nin per ekspresletero la jenon:

La Ministeria Konsilantaro de Bulgario en sia kunsido de 18. septembro pridiskutis la demandon pri la okazigo de l'XVI-a Universala Kongreso de Esperanto en Sofia kaj donis sian konsenton pri tio.

La subvencio donota de la ŝtato estos fiksata en pli posta kunsido. Post tiu ĉi akto de la Ministeria Konsilantaro neniam malhelpoj ekzistas por la bona aranĝo de la XVI-a en Sofia, kaj la oficiala subteno de la ŝtato estas certigata.

Vastan helpon kaj subtenon promesis ankaŭ la urbestro de Sofia.

subskr. Simeonov,  
sekretario.

La tuta Esperantistaro gratulos niajn bulgarajn amikojn por tiu ĉi sukceso!

vajn malfacilaĵojn oni raportos al la poliestraro kaj al la policaĵo unuigita pri la polica fakkomando Esperantista. Krome, ke per propagand-parolado la aranĝo de kursoj estas preparata kaj kursoj komencataj.

Oni konsideru tamen, ke la policistaro interesiĝas pri la nure praktika flanko de la afero. La ideala avantaĝo de nia lingvo nur flanke interesas kelkajn personojn.

Estas facile atentigi la policistojn al la jam farata intensa laboro de la Tutmonda Polica Ligo. Ĝia oficiala organo publikigas interesajn fakartikolojn, raportojn el plej diversaj landoj kaj sciigojn de gravaj neesperantistaj aŭtoritatoj kiuj kun sukceso jam uzas niajn servojn, tiamane esplorante la taŭgecon kaj disvastigon de nia helplingvo.

Nia Ligo estas volonte preta informi interesatojn pri pliaj detaloj kaj doni konsilojn al ili por la propagando. Ni insiste petas propagandistojn, ke ili informu nin pri ĉiuj entreprenoj per, se necese, sufiĉanta resuma sciigo. Organiza disciplino postulas komunan laŭprograman laboron. Oni skribu al „Tutmonda Polica Ligo“, A. H. de Marich, Ŭllői-ŭt. 59, IV, 8, Budapeŝt IX, Hungario, aldonante la kostojn por respondo. Mi atentigas ankoraŭ speciale al nia oficiala organo „La Policisto“ kies abono estas rekomendinda. Detalojn oni vidu el la aparta anonco sur 4-a paĝo.

Ni firme esperas, ke la tuta Esperantistaro, bone taksante la unuan sukceson sur tiu ĉi kampo, helpos al ni atingi la ĉefan celon, la akcepton de Esperanto kiel internacian helplingvon de la policistaro. La helpo de fak kolegoj estas speciale dezirata kaj salutata.

A. H. de Marich,  
Direktoro de la Tutmonda Polica Ligo.

### Raporto de Sinjoro Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro.

Depost la antaŭjara Kongreso la Sekcio por la Komuna Vortaro daŭrigis labori senbrue kaj sendanke laŭ sia kuniĝo: ĝi preparis kaj starigis la Trian Oficialan Aldonon, kiun la L. K. poste aprobis kaj oficialigis.

Baldaŭ aperos ankaŭ plena oficiala radikaro kun revizitaj kaj korektitaj nacilingvaj tradukoj kaj kun Esperantlingvaj difinoj, kompletigantaj la Vortaron de Kabe. La unua kajero enhavas la anglan, francan kaj germanan tradukojn, kaj poste sinsekve aperos aliaj kajeroj, enhavantaj la alilingvaj tradukojn, kiuj estas jam nun preparataj.

Sciencaj studoj pri la problemoj de la pseŭdosufiksaj kaj pri tiu de la internaciaj vortoj estas komencitaj, same kiel preparaj esploroj por la internacia kolektado kaj tradukado de proverboj, komparoj kaj metaforoj. Inter la laboremaj kaj sindonaj kompetentuloj, kiuj plej aktive jam kunlaboris en tiu ĉi grava kaj utila kompilado, mi devas precipe citi kaj danki s-ojn Agic, Arnhold, Bastien (kiu certe meritas la unuan lokon inter la citatoj), Blok, Bulthuis, Couto Fernandes, Inglada, Kristanov, Kühnl, La Colla, Lundgren, Millidge, Stojan, Tellini. Tiuj ĉi lastan mi devas duafoje citi kaj danki pro la vortaro Esperanta-Friula kaj Friula-Esperanta, kiun li verkis kaj kiu espreble estos iam publikigata.

La Direktoro de la Sekcio verkis la aperintan Raporton pri la Landnomoj kaj multege korespondadis kun Esperantistoj, kiuj sin turnis al li. Li volonte korektis diversspecajn manuskriptajn verkojn, kiuj estis prezentitaj al lia ekzameno. Multajn pli novajn librojn kaj vortarojn li zorgis pristudis, bedaŭrante, ke tiuj verkoj ne estis prezentitaj antaŭ la presado al la kontrolo de la Komunvortara Sekcio, ĉar tia kontrolo estas la sola rimedo, por certigi la unuecon de la lingvo kaj la internacian komprenleblecon.

Mi kaptas kun plezuro la unuan okazon, por aparte danki s-ojn Aymonier, Bailey, Cart, Christaller, E. Gaston, J. Grau, Kühnl, La Colla, Mazzolini, Meazzini, Migliorini, Rollet de l'Isle, Stojan, Waringhien, E. Wüster, kiuj kun afableco kaj kompetencie liveris al mi respondojn pri diversaj demandoj kaj duboj.

La Komunvortara Sekcio, konstatante kun ĉagreno, ke la plimulto de la verkantoj ne observas la ripetitajn konsilojn de Zamenhof kaj de la Akademio, denove rememorigas al la Esperantistaro sian antaŭajn admonojn kaj insiste petas, ke neniu enkonduku ian novan radikon aŭ formon, antaŭ ol li estos konsultinta ne nur unu lingve kleran kaj spertan Esperantiston, sed kelkajn malsamlingvanajn kompetentulojn.

Por faciigi tiun ĉi konsultadon, kiun Zamenhof opiniis kaj ofte deklaris tute necesa, la Sekcio tuj starigos diverslingvanan komisionon, kiuj prenos sur sin la taskon, ekzameni la publikigitajn verkojn kaj vortarojn, kiujn oni prezentos al ĝi. Tiamaniere la aŭtoroj bezonos nur sin turni al la Direktoro de la Komunvortara Sekcio, 51 rue de Clichy, Paris IX, kiu transdonos la ekzamenotan verkon sinsekve al la diversaj difinitaj kompetentuloj. La ekzameno ĉiam fariĝos senprokraste kaj kiel eble plej rapide, kaj la atesto de tiu kontrolo kaj korektado certe estos valora rekomendo apud la publiko. En ĝi kuŝas la sola rimedo, por kontraŭstari la danĝerigan emon de tiuj, kiuj senĉese kaj senripense novajn internacian nekompreneblajn radikojn aŭ esprimojn uzas simple pro tio, ke ili tiamaniere pli rapide kaj pli senpene tradukas ian naciaĵon.

La ideo pri tia komisiono ne estas nova, ĉar jam dum la jaro 1911 s-o J. Borel skribis en Germana Esperantisto: „Post la malapero de la Kolekto, aprobita en 1905, ni do ne plu havas ian kontrolon por novaj eldonaĵoj, kaj de tio povas naskiĝi grava danĝero. Tamen tiu danĝero povus esti grandparte forigata per laicela rimedo. Tiun rimedon mi vidas nur en kreo kaj subteno de oficiala internacia komitato por revidado antaŭ la presado. Tiu ĉi komitato, elektota kaj kontrolata de nia lingva estraro, devas esti kunmetata de kompetentaj diverslingvaj Esperantistoj. Evidente oni ne povus devigi ĉiujn aŭtorojn aŭ eldonistojn submeti siajn eldonaĵojn al la kritika esploro de la internacia komitato. Sed ili baldaŭ ekvidus, ke estas ilia profita tion fari, ĉar la publiko, por esti certa, havi nepra taŭgajn lernilojn, postulos la ateston de la oficiala revido. Mi ankaŭ ne dubas, ke, por havi la

privilegion de l'oficiala atesto, ĉiuj eldonistoj volonte farus monoferon kaj pagus al la komitato difinitan procenton de la vendprezo.

Car tia antaŭkontrolado estas nebla por la gazetoj, la Komunvortara Sekcio denove atentigas la redaktorojn kaj gazetajn gvidantojn pri ilia grava respondeco kaj pri ilia devo, korekti aŭ forĵeti la lingve nekorektajn presotaĵojn. Pli kaj pli ofte oni legas aŭ aŭdas plendojn pri la intoleremo de la gazetaj gvidantoj fial ke ĉiu presita nekorektajo erarigas la legantojn kaj difektas la lingvon.

„La pli granda pario el la ricevitaj de ni manuskriptoj“, skribis iam s-o Hodler, „enhavas erarojn, kiuj povus esti evitataj, se la skribintoj komunikis sian manuskripton al sperta Esperantisto, antaŭ ol ĝin sendi al la redakcio.“ Oni skribu artikolojn nur, kiam oni sufiĉe scias Esperanton. Kaj antaŭ kelkaj semajnoj s-o O. Bünnemann prave rememorigadis al la redaktantoj de Esperantistaj gazetoj ilian respondecon pri la lingva disciplino, kiu sola povas certigi nian sukceson, ĉar la evoluo de nia lingvo ne povas konsisti el senŝenca senkontrola aldono de neologismoj, sed el plisimpligo de la formoj kaj aldono de novaj vortoj nur en okazo de absoluta neceso.

Al la gazetaj recenzintoj estas rememoriginda la konsilo, kiun donis s-o Pujula: „La recenzistoj frapu senkompatate, ĝis kiam nur lertuloj kuragos trempi la plumon en tinton.“

Aliflanke la Komunvortara Sekcio intencas ankaŭ, baldaŭ organizi alian komisionon, por ekzameni kaj kritiki oficiale la senkontrolate presitajn verkojn, malaprove signante la malbonajn aŭ senutilajn radikojn aŭ formojn, kaj rekomendante kaj diskonigante la taŭgajn, nove konstruitajn vortojn aŭ esprimojn.

La metodon, kiun tiu ĉi komisiono devos observi por plenumi sian taskon, klare kaj ĝuste montris jam antaŭ dekkvar jaroj s-o Wenger en Germana Esperantisto: „Legante Esperantiajn tekstojn, ĵurnalojn aŭ librojn, la membroj notus la erarojn plej atentindajn, ĉu malbonajn novajn vortojn, ĉu malĝustajn esprimojn aŭ precipe naciajn idiomismojn. Poste, de tempo al tempo, eble ĉiun monaton, ili sendus siajn plej gravajn notojn al la prezidanto, kiu ilin studus mem aŭ studigus de aliaj membroj. Fine la rezultoj de tia studado aperus, kiel nuraj konsiloj, en organo jam tute preta, por ilin akcepti.“

Ĉiu Lingvokomitato, kiu estas preta kunlabori en tiu el ambaŭ komisionoj, bonvolu sin tuj anonci al la Direktoro de la Komunvortara Sekcio. Kompreneble, ĉiu ajn laborema kompetentulo, eĉ ne apartenanta al la L.K., estas invitata, sin ankaŭ anonci, ĉar li tiamaniere havos taŭgan okazon, por konigi sian kompetentecan.

Multaj malamikoj en la nuna tempo malhelpas kaj endanĝerigas la Esperantlingvan aferon, ne nur eksteraj malamikoj, sed ankaŭ internaj, kiuj, ne komprenante la efektivajn kondiĉojn kaj bezonojn de internacia lingvo nek la verajn principojn de la Zamenhofa fundamento, pretendas altrudi al ĉiuj siajn personajn plaĉojn kaj kapricajn fantaziojn, kaj semas la malkonkordon kaj malpacon inter niaj vicoj.

Eksterajn malamikojn kontraŭbatali, estas la propra tasko de la Propaganda Instituto, de UEA, kaj de niaj naciaj federacioj kaj societoj. Firme kontraŭstaru la internajn malamikojn, estas la difinita tasko de la Oficialaj Lingvaj Institutioj, koscijaj pri sia devo kaj pri sia respondeco.

Hodiaŭ pli ol iam ni bezonas la unuecon kaj memvolan disciplinon, kiujn la plene aŭtoritata kaj unuanime respektata Prezidanto de la Lingvaj Institutioj ĉiam senlace predikas kaj postulis. Vi povas esti certa, kara kaj altestimata Prezidanto, ke ĉiuj klarvidaj Esperantistoj fidele obeos viajn konsilojn kaj kuraĝe subtenos vian agadon eĉ foroferante, se necese, al la alta komuna celo kelkajn personajn gutojn kaj detalajn preferojn. Vi povas aparte fidi, ke la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro, kiu senŝence kunlaboras kaj kunpenadas kun vi en plena akordo, celkonscia interkonsento kaj kora harmonio, senŝancelige kaj senmanke daŭrigos helpi vin per ĉiuj siaj fortoj.

La devizo de la Esperantistaro nepre devas esti: unueco antaŭ ĉio; unueco estas la nura garantio de nia estonta triumfo.

Prof. E. Grosjean-Maupin

Direktoro de la Sekcio por la Komuna Vortaro.

**Tria Rumanlanda Esperanto-Kongreso en Timiŝoara.**

(Komparu ankaŭ ET n-o 153.)

Pro la rapida forsendo de la Timiŝoara raporto forrestis kelkaj notindaĵoj, kiujn ni jene kompletigas:

Ne estis sufiĉe akcentita la internacia karaktero de la III-a Rum. Esp. Kongreso, kvankam krom la jugoslava reprezentanto, s-o Kurz, ĉeestis kelkaj turkaj samideanoj kaj 120 bulgaraj geesperantistoj sub la gvido de s-oj prof. Minkov kaj Temelkov. Eĉ en la kongresbala belega konkurso el la tri premiitoj du estis bulgaraj, la graciaj samideanoj Vera Sokolova (Sofia) kaj Zora Malakova (Timovo). — Konsiderante, ke mem la enlanda kongresnaro konsistis el ru-

mano, hungaroj, germanoj kaj rusoj, rezultiĝas, ke la sola lingvo uzita estis Esperanto, ne nacia lingvo, kiel kutime eĉ naciaj kongresoj.

Ci-loke ni povas respondi al niaj karaj ĉeĥoslovakaj samideanoj, ke ja ankaŭ nia registaro tre faciligis la veturojn al nia nacia kaj al la monda kongreso per plifaciligo de l'vizoformalaĵoj kaj per 75%a rabato fervojo. Ankaŭ la bukreŝtaj konsulejoj germana, bulgara kaj germana per diversaj rabatoj favoris. La limoficejoj sen ia dogana revizo translasis la kongresvizitantojn.

La ĝenerala helpo de la oficialaj rondoj ja ne estus sufiĉinta por sukcesi, se la organizan komitaton ne estus gvidinta per trafaj konsiloj kaj tre inteligenta kunlaboro s-o Simu, inspektoro de l' Fer-Uzinoj „Reŝita“ kaj honora prezidanto de l' org. komitato. Bedaŭrinde nia altestimata samideano pro troa okupiteco ne povis ankaŭ per persona ĉeesto ĝui la kongresajn laborfruktojn.

Cie sin distingis s-o ăeleŝti Marin Georgescu, komandanto de la skoltroj. Lia senlaca laboro rikoltis la plenan kontenton de la eksterlandaj gastoj, de ili prizorgitaj, kaj dank al lia konvinkiga propaganda parolo komenciĝis tre multnombra kurso inter la skoltistinoj en Timiŝoara. *Esp. Centro Rumana.*

**Socia Vivo.**

**Enketo pri Produktado.**

La unua volumo de la raporto rilata al la enketo pri produktado farita de la Internacia Labora Oficejo estas eldonita.

Tiu enketo estis entreprenata laŭ propono farita de s-o Alberto Pirelli, granda itala industriisto, en la kunsido de la Administra Konsilantaro de la Oficejo en junio 1920. Aprobante tiun proponon, la Konsilantaro decidis komisi al la Oficejo la taskon fari enketon pri industria produktado en diversaj landoj, konsiderante ĝin rilate al laborokondiĉoj kaj vivkostoj. Oni devas rememori, ke, en tiu epoko, ekzistis ĝenerala malpliigo de produktado. La celo de la enketo estis, interalie, ekzameni ĉu laborreguloj, kiel la okhora tago, la forigo de popecaj salaĵoj en iuj landoj, ktp., estas parte kulpaĵi pri tiu situacio. Estis intencite, ke la enketo ampleksu ĉiujn faktorojn provantajn efiki malpliigon de produktado, kiel la mankon de krudaj materialoj, la transportmalfacilaĵojn, la malaltigon de valuto, la mankon de kredito kaj la mankon de vendejoj.

Tamen la situacio tute aliĝis preskaŭ tuj post la decido pri la enketo. Tial la Internacia Labora Oficejo devis, en sufiĉe longa antaŭparolo, montri, kiel la ĝenerala postmilita malabundeco, la sekvanta komerca krizo en pluraj landoj, la malpliigo de produktado kaŭzita de la malfacileco trovi vendejojn, kaj la rezultita senlaboreco, okazis intersekve kaj profunde influis la ĝeneralan ekonomian situacion.

Kun la ekonomia krizo, la problemoj pri laborokondiĉoj grandezure alprenis novan aspekton. La rezulto de la enketo estos eldonata francalingve en kvar volumoj, kaj oni ankaŭ eldonos resumojn en la ceteraj pli gravaj lingvoj, speciele en angla kaj germana lingvoj.

La unua volumo, kiu nun aperas, estas enkondukita de letero de s-o Albert Thomas, la Direktoro de la Internacia Labora Oficejo, al la Prezidanto de la Administra Konsilantaro, en kiu li rememoras la devenojn de la enketo, la ĉiuspecajn malfacilaĵojn, kiujn ĝi renkontis, kaj la diskutojn, kiujn ĝi okazigis. Sekvas ĝenerala antaŭparolo montranta la saŭgajn, kiuj okazis en la tiumonda ekonomia situacio de post la epoko, kie oni decidis entrepreni la enketon.

Tiu ĉi unua volumo enhavas detalojn pri la plano de la enketo kaj ĝia progreso, ankaŭ la tekston de la demandoj eldonitaj, kaj liston de la 29 registaroj, 180 industriaj organizadoj, kaj 39 federacioj de kooperaj societoj, kiuj respondis al tiuj demandoj, liston de la 206 personoj konsultitaj, ktp. Estas ankaŭ pli ol 200 paĝoj da informoj bazitaj sur la respondoj de la diversaj registaroj, kune kun bibliografio. Krom tio estas 40 statistikaj tabeloj kaj 92 diagramoj.

La dua volumo de la raporto estas jam en presado, kaj la lastaj du volumoj aperos post du aŭ tri monatoj.

La unua volumo donas ideon pri la laboro farita de la Internacia Labora Oficejo, amasigante escepte riĉan kolekton da materialo, kaj de la graveco de tiu materialo por la aktualaj ekonomiaj kaj sociaj problemoj. Kiel diras s-o Thomas, en sia enkondukita letero, la kvanto da informoj kolektitaj kaj la analizo, al kiu ili estas submetitaj, havos la plej altan valoron por la esplorado kaj por ĉiuj personoj, kiuj interesiĝas pri la laboro por socia progreso entreprenata de la Internacia Labora Oficejo.

**Kroniko.**

Por servi nian legataron per ĉiam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgojn (sur poŝtkarto aŭ aparta folieto unuflanke skribite, sed ne inter-administrativaj privataj skribaĵoj) pri ĉiu novaĵo el la Esp. movado. Kondiĉoj: rapide, koncize, fidinde, legeble (precipe nomoj).

**Beljujo.**

Antwerpen. Okaze de la kongreso de la Belĝaj Knabo-skoltroj „Baden Powell“ de la 9.-16 sept. estis organizita tre interesa priskolista ekspozicio. Dank al la klopodoj kaj propra laboro de nia samideano Van Gulck, la vizitantoj de tiu ekspozicio povis ankaŭ admiri belan selecion pri Esperanto. Ni profitas tiun okazon por gratulini nian junan amikon Van Gulck pro lia laŭdinda propagandado inter la skoltroj de Antwerpen. *F. S.*

**Ĉeĥoslovakio.**

Praha. Ĉeĥoslovaka Esperanta Instituto, kies celo estas sistema propagando de Esperanto kaj peresparta propagando de ĉeĥoslovakaj aferoj, elektis en sia konstituiganta ĝenerala kunveno la 11.9.1923 jenan estraron: A. Piliĉ, prezidanto; V. Čánský, ĝen. sekretario; J. Eiselt, I. Šupichová, S. Dlouhá, F. Háček, K. Hlaváčová, komitantoj; F. Novák, B. Weiner, revizoroj; F. J. Havelka, Dr. M. Laurinová, A. Paukert, B. Molnár, anstataŭantoj. Adreso: Praha II, Křemencová 17.

**Francujo.**

Perpignan. 40 ĝenerlanoj vizitis la Esperantajn kursojn dum la jarmaro 1923-1925. Dum la somero la grupo aranĝis ekskursojn al „Força-Réal“, Saint Martin du Canigou, Collioure, Argelès kaj la lasta la 50 sept. al la emitejo de „Domanova“. Post vigla propagando de la komitatoj kaj precipe de s-o René Lech, ĉefsekretario de la Esperantista grupo, la Komercia Cambio de Perpignan voĉdonis favore al Esperanto. La Esperantistaj kursoj malfarmigis la 2., 3. kaj 5. oktobro ĉe la Laborborso. Departementa kongreso de Esperanto kaj Esperantista festeno okazos dimanĉo, la 16. dec., je la okazo de la datreveno de l' naskiĝotago de nia Majstro. Por ĉiuj informoj oni turnu sin al s-o René Lech, 5 Rue de la Savonnerie en Perpignan.

**Germanujo.**

Copitz. Esp. oficiala laŭvola fako en la popolernejo deponat pasko 1925. I klaso kun 50 geknaboj. Alskribajoj petataj al s-o GJHennig, instruisto, Poststr. 15. Heidenau. Nova kurso por lab-ristoj komencia. 20 p. Lohmen. 3 profesiaj instruistoj propagandas. Pirnaa. E. Kurso por lab-ristoj komencia. 54 p. (21.9.23.) Alskribajoj petataj al s-o P. Göckcr, Gartenstr. 52. Ses profesiaj instruistoj estas bonaj Esperantistoj. La malprogresema urba magistrato duan fojon malkaĉepis enkondukon de Esp. en la lernejoj, kvankam la lerneja komitato perdecidis. Oni daŭrigas la klopodojn. En la publika urba legejo estas legebla ET kaj Germana Esperantisto. La loka gazeto estis favora al nia movado. Dum landa instruista konferenco Esperanta ekspozicio estas aranĝita. Okazis propagandoparolado.

Koblenz. 6.9. kaj 12.9. propagandaj paroladoj de s-o E. Stroh. 15.9. nova kurso kun 14 ĝeparioprenantoj, kiun gvidas s-o L. Funken. Sukceso de IREKO estas, ke la Rejnmuzeo, kiu la Internacia Rejna Karavano vizitis la 30.7., tradukigis Esperanten la gvidilon kaj intencas Esperantigi ankaŭ la broŝuron „Reinologio“.

**Hispanujo.**

La Iberia Kufederacio de Esperantistoj de Hispanujo kaj Portugalujo estas fondita en la kongreso, okazinta en Valencia la 17.-20. majo. La dua kongreso de la Esperantistoj de Iberiaj landoj okazos en Bilbao eble dum la printempo de la jaro 1924.

En Madrido oni laboras por starigi grupon de Esperantistaj Poŝtistejoj kaj eble ankaŭ Telegraf-oficejo.

**Jugoslavio.**

Split (Dalmacio). Jus finis la trisemajna kurso gvidita de s-o Ručić, del. de UEA kaj prez. de Esp. klubo. La sukceso estis tre bona kaj la klubestraro decidis gvidi de nun nur tiajn kursojn. Inter la lernintoj estis lia kanonika moŝto, la urba parohestro Don Marko Kalogiera kaj urba kuracisto D-ro Petro Rismondo.

La movado tre bone progresas kaj la elekto de Split kiel sidejo de la venonta II-a Jugoslava Esp. Kongreso estas la plej bona pruvo pri la granda sukceso en Dalmacio.

Dubrovnik (Dalmacio). La plej bea kaj interesa urbo en Dalmacio certe estas Dubrovnik (Ragusina). Historiaj vidindaĵoj kaj naturaj belecoj ĉiutारे allogas grandan nombron da eksterlandanoj. Esperanto vivas ankaŭ ĉi tie. Juristo s-o Monić gvidas bone vizitintajn kursojn. Lia oficejo anstataŭas lervora samideano s-o Mačić el Split. Fando de klubo projektiata.

Omiš (Dalmacio). Ĉi tie oni divastigas Esperanton nur inter laboristoj ĉar la aliaj klasoj ne interesiĝas. La kurso, gvidata de l'ignajstoj s-o Buljević, tre bone sukcesas. Oni preparas la fondaĵon de grupo.

Podgora. Samideano Sumić, lerninte Esperanton en Wien, baldaŭ malfarmos kurson.

**Nederlando.**

La Haga sekcio de la Nederlanda Vegetara Unuigo organizas Esperantan kurson por siaj membroj.

La 21. sept. la Haga Esperantista Societo „Por Dio kaj Eklezio“ festsian jarkvinton en salono de „Unias“, Prinsestraat Haga.

Aalsmeer. La 29. aŭgusto la Esp. klubo partoprenis al florfesto per ornamita veturilo. Ĝi montris grandan stelon (2 1/2 m altan) per vivanta verdajo kun 20 diversnaciaj flagoj kunigitaj per verdaj rubandoj.

La simbolo: „Esperanto estas kunigata kun ĉiuj landoj.“ Bona propagando kun bonega sukceso.

**Esperanto en la nederlandaj lernejoj.**

La neŭtrala knabina „Sweetnick-lernejo“ en Hag-o enkondukis oficiale Esperanton kiel devigan fakon en la 2-a klaso. Gvidantino s-ino Isbrücker.

La instituto „Poni“ tre konata en Hag-o por diversaj klerigaj kursoj malfarmis kurson en Esperanto. Gvidanto s-o Orth.

La Popola Universitato en Rotterdam iam por la kvara jaro organizas kurson en Esperanto. Gvidantino s-ino Isbrücker.

**Polujo.**

Bydgoszcz. Dank al pejo, anoncita en Esp. gazetoj, ricevis la ĉi tiea Urba Biblioteko multajn donacojn el eksterlando. La biblioteko posedas nun apritan Esp fakon. La Bydgoszcz-a Muzeo turnis sin oficiale al prof. Kronenberg, urba konsiliano, kun propono, ke li pere de Esp. interŝanĝo kaj vendu multajn diverslandajn duoblaĵojn: moneroj, pm. ktp. Propojn direktitajn kun resp.-kup. al: prof. L. Kronenberg, Bydgoszcz, Polujo.

Esp. kurson kun 10 personoj finvidis s-o Prangel. La Komercia Kambo — dum germanaj tempoj estis ĝia sindiko D-ro Kaudl, konata Esperantisto — fondas novan superan komercan lernejon. Pola Esperanto Servo turnis

**VARBU ABONANTOJN!**

sin kun afabla helpo de prof. Kronenberg al la estraro de loka Komercia Ĉambro, proponante enkonduki Esp. en la lernoplanon de la fondata lernejo. S-ano Pankratz, redaktoro de la Pola Parlamento, faris dum sia restado en Germanujo kelkajn sukcesajn paroladojn en Berlino kaj Schneidemühl.

**Poznań.** S-ano Walther Maas, stud. phil., deziras vigli la Polujan movadon pacifistajn. Speciala ligo fondita. Polaj s-anoj, absolutaj pacifistoj, sendu sian adreson al: s-o W. Maas, Poznań, ul. Mostowa 1.

**Pola Esp. Servo, Bydgoszcz.**

**București.** Pasintan semajnon du eminentaj Esperantistoj, aj gastoj vizitis la rumanan ĉefurbon: s-o Jan Firkle, fervojinspektoro el Bratislava (Ĉeĥos.) kaj s-o Gino Lupi, profesoro de literaturo el Milano, kiu per Esperanto faras studvojaĝojn en Eŭropo. Dank' al la vizito de la eksterlandaj samideanoj, la Bukareŝta Esperantistaro havis du tre ĉarmaj pasigitajn klubajn vesperojn, bonefikajn ankaŭ por ekstera propagando.

**Sfi. Georgejhe.** Fervore propagandas s-o senatano E. Balas. La gazeto „Progreso” de s-o B. ĉiusemajne en la havas diversajn interesajn sciencojn priesperantajn. La artikoloj el ET ĉerpitaj ĉiam aperadas kun la mencio: „La Esperanto Triumfonta”.

**Ekonomio.**

**Valuta projekto en Hungarlando.**

Le malpliigo de la aĉetforto de la hungara paperkrono kaŭzis al la ekonomia vivo de Hungarujo gravajn vundojn. Ankaŭ la socian vivon ĝi influas efektive ruine. La hungara ŝtato eĉ ĉia sindeteno de la valuta ŝveligo pro manko de kreditfontoj estas devigita, ĉiam kovri la videble kreskantan deficiton de la ŝtata mastrumado, kaŭze de la mona senvvalorigo, per eldono de bankbiletoj kaj pliigo de ilia cirkulado.

Tio kondukas, kiel la itala historiisto Guglielmo Ferrero tiel sprite kaj trafte deklaris, al la „hidropso de la mono”, kaj per tio al la danĝera stato por la tuta ekonomia organismo danĝera stato por la tuta ekonomia organismo kun ĉiuspacaj incitadoj kaj tute strangaj eksteraj efikoj. Esperante eksterlandan pruntojn la hungara registaro provas organizi sanigan laboron en la ekonomia vivo per kreado de valorkonstanta fundamento. Oni estas konscia pri tio, ke la ĝenerala valorigado por antaŭvidebla tempo ankoraŭ ne estas ebla. Komence oni volas provi per la valorigado de la kreditoj kaj bankdeponoj. La hungara financministro komisiis per la rilataj preparaj laboroj komisionon, kiu ĵus nun havis konsilion kaj deklaris sian opinion, ke estas necesa la laŭleĝa regulado de la valorkonstantaj kreditoj kaj deponoj. La prepara komisiono devas redakti post aŭskulto de fakistoj el ĉiuj profesiaj branĉoj leĝoprojekton kaj tiun laboron trondoni al la financministro por aprobo. Kompreneble al la financministro povas okazi, ke en la fakkonferencoj la diversaj interes-rondoj kelkfoje akre interbatalos, tamen tiu ne detenas la respondecajn registaranojn de parta realigo al la valorigado. Ĉiukaze estas ankaŭ la laŭgrade projektita solvo de la valor-anknaŭ la laŭgrade projektita solvo de la valor-igadproblemo signo de tiu bona volo, ke oni estas decidema krei novan fundamenton por la ekonomia solidiĝo. *Hungara Esperanto Servo.*

**Scienco.**

**Vizito al sismografaj stacio.**

Sismografaj stacioj estas ordinare kunigitaj kun stelobservejoj; sed tio ne signifas konfirmon al la Faib'a teorio pri la influo de la astroj je terskuigoj. Astronomio kaj sismografologio laboras laŭ tute malsamaj direktoj kaj tamen fine celas la samon: informiĝi pri la stelo, sur kiu ni loĝas.

En la sismografaj stacioj kunigitaj kun stelobservejoj la scienco rigardas kvazaŭ per unu okulo al la malproksimaj steloj kaj per la dua en la plej profundajn profundajn de la tero. Per la teleskopo ĝi „malsuprenigas la stelojn de sur la ĉielo”, kaj per la sismografo (la kaptumado de terskuigaj ondoj estas efektive nur flanko celo) ĝi diafanigas la teron, por ekkoni la tavolojn, la konstruon de la tera korpo, kaj aŭskultas — per la okulo! — la pulsobatojn kaj febrokonvulsiojn de la tero, same kiel kuracisto la korobatojn de malsanuloj per aŭskultilo.

Eĉ la kiera nefakulo apenaŭ scias, ke la ĉef-intereso de la scienco pri terskuigoj konsistas en tio, ekkoni la internan konstruon de la tero. Por la scienco la teron, kiun skuiĝo pelegas tra la tero, estas la sama afero kiel por kuracisto la elektra ondo, kiu per Roentgenaparato diafanigas la homan korpon.

Kun korpore, preskaŭ kun fimsento de dependeco, oni staras en la malvasta ĉambro, kiu enhavas la sismografon. Ĉi tiu sento eĉ pli iĝas pro la simileco de la ĉambro al sarkofagejo: dikaj, firmaj muroj, kiuj tralasas la taglumon per unu sola fenestro. Ĉi tiu malvasta ĉambro estas eĉ en eĝo, konstruajeto en konstruajego. Ĉiuj sismografaj stacioj estas konstruitaj laŭ sistemo de skatolo en skatolo. La ekstera konstruajeto sole celas deteni malhelpantajn influojn el la ekstera kaj supra mondo: vibradojn pro preterpasantaj veturiloj, meteorologiajn efikojn ktp. En la interna domo, sur betona fundamento atinganta ĝis la natura grundo, staras en granda, vitra kesto la sismografaj mezuriloj; fera konuso je alteco de homo, proksimume 20 centfuntajn peza, balanciĝas je rondigita pinto sur „kardana” ringo. Ĉi tiu

pendaĵo (ankaŭ sur ŝipoj ĝi estas uzata por malbligi, ke certaj objektoj, kiel ekz. lampoj, kunsvingigilo, kompasoj oscilu ktp.) estas la sekreto de l' sismografo. Se terskuiga ondo trafas la aparaton, la fero bloko kune kun la fulgumita „senfina” banderolo, sur kiun la ondoj notu la diagramon, restas senmova pro la inertece de l' maso, dum ke ŝtangentaro pinitiganta je du delikataj skribpingloj, partoprenas en la tera moviĝado. Per mekanikajo la tera moviĝado (kiu ekz. okaze de la japana terskuigado montris 1 ĝis 2 milimetrojn) estas ducentoble pligrandigata. Se la tero „ripozas”, la pingloj notas sur la fulgumita banderolo, malrapide sub ili antaŭenmoviganta, nur rektajn liniojn. Sed, se ekestas terskuigaj ondoj, analogie laŭ ilia alveno, la skribpingloj pasas zigzage tien ĉi kaj tien sur la fulgumita banderolo. Laŭ la grado de la movoj oni konstatas la fortecon de la terskuigo.

Ĉi tiuj procedojn komprenas eĉ nefakulo. Sed enigmo estas por li, kiamaniere estas konstatebla, el kiu distanco kaj el kiu direkto alvenas la terskuigaj ondoj. La respondo al tiu ĉi demando estas tre interesa. La naturo de l' terskuigo mem obligas al la scienco ekkoni ĉi tiujn aferojn. — Terskuigo ekestigas en la turo du malsamspacajn ondojn (tria speco, la „suprajaj” ondoj, ĉi tie ne havas rolon) i. e.: „longitudajn” kaj „transversajn” ondojn elastajn, el kiuj la unuaj vibrigas la terpartetojn laŭlonge, kaj la lastaj transverse je la direkto de la ondofludo. Ambaŭ ondospacoj trapasas la terkorpon. Rimarkinde estas, ke la du ondospacoj montras malsaman rapidecon kaj ankaŭ notiĝas malsame sur la diagramo de l' sismografo. La malsama rapideco kaŭzas, ke la ondoj ektrafas la sismografajn staciojn je malsamaj tempopunktoj. Okaze de la japana terskuigo la transversaj ondoj alvenis 10 minutojn kaj 30 sekundojn pli malfrue ol la longitudaj; el tiu tempodiferenco estas konstatebla, el kiu distanco la ondoj venis. Sur la diagramo oni povas diferencigi tre ekzakte tiujn ondojn; ĉar la transversaj ondoj ekestigas multe pli intensajn kaj ampleksajn zigzagoliniojn.

Pli malfacile konstatebla estas la direkto, el kiu venas la ondoj. Kun certeco ĝi estas konstatebla, se en la terskuiga originejo la falego de la ŝtonamasoj en la interno de l' tero okazas subite, kvazaŭ per unu bato. En tia kazo montriĝas sur la diagramo akra deflanĝigo laŭ la direkto, el kiu venas la terskuigo. Se la ĉefan falegon (kiel ekz. okaze de la japana skuigo) antaŭiras pli malgravaj falegoj por dispejiĝo, la deflanĝigo estiĝas malakra. Sed eĉ en tiu kazo la direkto de l' skuigo estas konstatebla, se oni havas la diagramojn de minimume tri diversaj sismografaj stacioj.

Per komparado de la diagramoj de diversaj stacioj — kaj ĉi tio estas la ĉefa tasko de la sismografaj — la scienco ankaŭ ekkonas la amplekson kaj strukturon de la diversaj tertavoloj. La spertojn faritajn en tiu ĉi rilato oni aplikas praktike okaze de borserĉadoj je enteraj minajoj ktp. Sur lokoj, kies geologiaj strukturoj oni deziras ekkoni pli precize, oni aranĝas artefaritajn terskuojn, ekflamigante grandajn kvantojn da eksplodebla materio. En certaj distancoj sur la eksplodejo oni starigas transporteblajn sismografajn. Komparante la diagramojn de la diversaj sismografaj stacioj kaj helpe de magnetaj mezuradoj oni povas konstati, ĉu la koncerna teritorio enhavas tavolojn de salo, karbo, fero ktp., kaj kiun amplekson havas la tavoloj. *Kiuza.*

**Malofia natur-fenomeno en Krakow (Pol.).**

La 18. septembro je la 22½ horo, dum la ĉielo estis nebulkovrita kaj iomete pluvetis, subite je la okcidenta parto disigis la nebulo, kaj montriĝis la leviganta disko de la luno. Samtempe en la kontraŭa parto montriĝis super Krakow ĉielarko, kies koloroj estis tre klare videblaj, precipe je la norda flanko. Tiu ĉi belega fenomeno povis esti bone observata dum 5 minutojn en kelkaj regionoj de la urbo. *D-ro Blassberg.*

**Komercistoj!**  
**Mankas**  
ankoraŭ viaj  
**raportoj kaj informoj**  
por la venonta  
numero de  
IK.  
**Sendu ilin tuj**  
al Redakcio de  
**„Internacia Komercio”**  
HORREM bei Köln,  
Germanujo.

**Geografio.**  
**Aŭtonomaj respublikoj kaj regionoj en Sovet-Ruslando.**

Nomo	Ĉefurbo	Dekreto pri formigo
Baŝkira respubliko	Sierliamak	29. 5. 1920
Tatara respubliko	Kazan	29. 5. 1920
Kirgiza respubliko	Orenburg	1. 9. 1920
Dagestana respubliko	Temir Han-Sura (centra Kaŭkazo)	25. 1. 1921
Monta respubliko	(Kaŭkazo)	26. 1. 1921
Turkestana respubliko	Taŝkent	15. 4. 1921
Krimea respubliko	Kazan	15. 10. 1921
Karela labor-komuno	Petrozabodsk	9. 6. 1920
Germana Volgaregiono	Markŝtadt	29. 4. 1918
Cabaŝa regiono	Ceboksari	29. 7. 1920
Votŝka regiono	Iŝosk	6. 11. 1920
Marija regiono	Krasnokaŝelsk	6. 11. 1920
Ziriana regiono	Uŝi-Siŝolsk	27. 8. 1921
Karegal-Ĉekesa regiono	Batalpaŝinsk	31. 1. 1922
Buriata-Mongolo regiono	Irkutsk	12. 1. 1922
Kabardino-Bardkara regiono	Nalĉik	27. 1. 1922
Jakuta regiono	Jakutsk	5. 1922

H. Frank, Kazan.

**Turismo.**

**Dalmacio, la lando de la suno kaj de la maro.**

La popolkleriga societo „Narodna Prosvjeta” en Split, ĉefurbo de Dalmacio (provinco de Jugoslavio) intencas eldoni luksan albumon, kiu entenas la plej belajn fotografajojn de niaj malproksime konataj naturaj, artaj kaj antikvaj vidindaĵoj. La albumo aperos en la lingvoj: angla, ĉeĥa, franca, serbo-kroata, germana kaj Esperanta.

La koncernaj prospektoj estos baldaŭ dissendataj al ĉiuj delegitoj de UEA. Mi volas tie ĉi atentigi miajn estimatajn kolegojn, ke Dalmacion ĉiujare vizitatis centmiloj da eksterlandanoj por admiri la senkomparajn panoramojn, la historiajn monumentojn kaj por ĝui kelkajn semajnojn nian sunon kaj maron.

Karaj gesamideanoj, konsideru ke tio estas unua Esperante redaktita propagandilo pri la belecoj de nia marbordo, kiun oni nomas la „sudaj fiordoj”, kaj atentu, ke se la unua sperto estos bona, ankaŭ la plujaj eldonoj de „Narodna Prosvjeta” favoros nian lingvon. Pro tio mi kore petas ĉiujn delegitojn rezenzi laŭ la ricevota prospekto la aperontan albumon en sia nacia gazetaro kaj sendi gazetarajn rakontojn rekte al suba adreso.

Rekomendu la mendon de la grandioza verko (la albumo estos granda 30x40 cm kaj krom la teksto enhavos 350 plej belajn fotografajojn en heliofipio sur plej luksa papero) ne nur al individuoj, sed ankaŭ al urbaj universitataj bibliotekoj, muzeoj, turismaj societoj ktp.

„Narodna Prosvjeta” celas vekti ĉe la eksterlandanoj pli da kompreno kaj ŝato por la orienta marbordo de Adriatiko, kie tiel kurioze kruciĝas la okcidenta kaj orienta kulturo inter palmoj, orangoj, oleandroj, agavoj, kaktaj, iasmenoj kaj alia subtropika vegetaĵaro.

Ĉiujn pluajn informojn ni senpage liveros *R. Rupčić, del. de UEA*  
*Palmita 9, Split, Jugoslavio.*

NB.: Por la biblioteko de „Nar. Prosvjeta” kaj de „Esp. Klubo” mi kolektas ĉiujn ĝis nun en Esperanto aperintajn gvildbrojn pri diversaj landoj kaj urboj. En la intereso de kiel plej efika disvastigo de nia lingvo mi petas ĉiujn estim. delegitojn, Esp. societojn, grupojn kaj gesamideanojn helpi min, ĉu donacante ĉu sendante tiuspecajn publikigaĵojn kontraŭ pago.  
Aliaj Esp. gazetoj estas petataj represi entute aŭ parte la supran alvokon.

**Nekrologo.**

Nobla koro ĉesis bati. Revenintaj poŝisendaĵoj sciigis al ni, ke mortis **P. Ernst Schmitz, Haifa (Palestino).**

Li estis unu el la plej longtempaj Esperantistoj. Germano de nacio, li restadis dum kelkaj jaroj en Brazilo, poste sur la Kanariaj Insuloj. Plurajn jarojn li estris la germanan kristanan hejmon en Jerusalemo. De post proksimume 2 jaroj li estis en Haifa. Li estis sperta scienculo kaj rikoltis grandajn meritojn en diversaj fakoj. Esperanton li propagandis kun neĉerpiganta fervoro. Li estis vigla korespondanto de pluraj gazetoj. Niaj legantoj konatiĝis al li per la „Leteroj el Palestino”. Koramon kaj ĝentilecon, respekton por Dio, al kiu li dediĉis sian tutan laboron kiel patro, sentigis ĉiuj liaj rilatoj. Helpema kaj servema, ĝis kiam antaŭ du ĝis tri monatoj malsano kaptis lin, li restis fidela amiko. Nia movado perdis fervoran anon. Li ripozu en paco. *R. Kr.*

En Hattingen a. d. Ruhr subite mortis **F-ino Maria Sahler, flegistino.**

Kiel fervora samideanino ŝi ankoraŭ ĉestis la Dekkvinan. Nun la malseka tero ŝin kovras. Honoron al ŝia memoro. Al ŝiaj parencoj ni esprimas per tio nian profundan kondolencan.



# Por Distrado.

Multaj homoj sopiras je flugiloj, kaj tute forgesas, ke piedojn ili havas.

## Islanda popolkanto.

Ho, bela estas nia ter,  
kaj glaj verdherbaroj,  
Dum ĉarmaj tagoj de l' somer  
sin paŝas la brutaroj.  
La bluaĵn randojn de la val'  
la sun' dorlotas kore,  
Sonegas laŭte akvoŝal'  
la maro brilas ore!

Prapatra land! Carmega dum  
la vintro, kiam montoj  
sin banas en la ora lum'  
de l' borealaj fontoj.  
La steloj ekspulas sin  
en la glacia glato,  
Sed elfoj dancas jam sentin'  
sur blanka neĝa plato.

Polvoron de l' prapatroj, ĝin  
vi kovras bone, tero!  
Sur bauta\* ŝtonoj movas sin  
la vivo kaj espero.  
Ho, land, kun via infanar'  
vin benu la ĉielo  
ĝis plu ne kreskos verdherbar',  
ĝis plu ne brilas stelo.

Tradukis Magnus Porleifsson  
Hvemstanga, Islando.

\* bauta-ŝtono = tombŝtono (antikva islanda lingvo).

## El „Golestan“ de Saadi.

lunokte, mi memoras, mia kara amikino alvenis mian domon. En tia eksĉitigo mi ekleviĝis de mia loko, ke la lampon per la maniko mi reverŝis.

Nokte aperis al mi la vizio,  
Per la vizaĝo malhelon lumigis.  
Tute felicia mi en la mirego!  
Tiu ĉi sorto estas de kie?

Ŝi sidigis kaj komencis min riproĉi:  
„Kial en la momento, kiam vi min ekvidis, vi ekŝtingis la lampon?“  
„Mi pensis“, diris mi, „ke la sunlumo aperis.“  
len kiel spiruloj parolas:

Kiam karulino venas al via lampolumo,  
Leviĝu kaj ŝin brakumu.  
Se ŝia buŝo ridetos dolĉege,  
Ŝian manikon prenu kaj la lampon estingu.

Mi memoras, ke iam en la tagoj de l' juneco mi tra iris la bazaron esperante vidi la lumvizaĝulinon. Estis la tagoj de julio, kiam la varmege sekigas la salivon de l' buŝo kaj la varma vento boligas la karbon de l' ostoj. Pro korpa malforteco mi ne subportis la varmon de la tagmeza suno kaj trovis rifuĝejon en la ombro de muro, esperante ke iu faciligos miajn turmentojn de soifo kaj ĝin estingos per akvo.

Subite en la ombro de l' vestiblo de iu domo mi vidis lumon. Tio estis la belulino, kies belecon priskribi estas malkapabla la plej elokventa lingvo. Ŝi aperis, kiel venas mateno post maluma nokto aŭ kiel eligas vivelekŝiro l' fonto.

## Literaturo.

### Soveta poezio.

En la nuna Ruslando la plej modernaj „direktoj“ sur ĉiuj kampoj de la arto ekradikis. La nova literaturo tre havas nepre futuristan karakteron, pri kiu Ivan Faludi en la ĵurnalo „La blua Kajo“ faras la jenajn interesajn klarigojn:

Baldaŭ post sia fonda en Italujo, la futurismo estis enkondukata en Ruslando, kiam Viktor Ĥlebnikov en 1910 per sia unua volumo de vers-fleblitaj surpaŝis la futuristan vojon. Post unu aŭ du jaroj li jam havis samideanojn: Majakovski kaj Guro. En la jaro 1914 ekzistas jam futurista ĵurnalo en Petrograd; la rusaj adeptoj de Marinetti en maskoj kaj kun kolorumitaj vizaĝoj polemikis kun la ŝtrata publiko. Sur la rusa scenejo la futurismo ekaperis per la opero de Kruĉonjaj „La venkita suno“, prezentita en 1915; la dekoraj estis de Maljeviĉ. — Novaj frazkunligoj, novaj vortoj kaj komparoj — tio estis la elementoj de l' futurismo. Ankaŭ la plej talenta, moderna poeto Majakovski ne progresis pluen. Oni rigardu nur la personojn de lia „Tragedio Majakovski“, en kiu li priskribas sin mem, kaj tuj oni konstato la daŭrigon de la simbola modo. Jen la personoj de tiu ĉi tragedia: Vladimir Majakovski, poeto 20-ĝis 25-jara. Konata sinjorino, du metrojn alta, kiu ne parolas. Maljunulo kelkmiljara kun putrintaj maljunaj katviroj. Viro sen oreloj. Blindulo kaj lamulo. Viro sen kapo. Viro kun longeta vizaĝo. Ordinara junulo. Sinjorino kun subokulaj larmŝvelaĵoj. Sinjorino kun lamoj en la okuloj. Sinjorino versanta larmojn.

Ŝi tenis en la mano kalikon plenan je neĝakvo, mikŝita kun sukero. Eble ĝi estis eĉ parfumita per rozakvo aŭ per kelkaj gutoj da alkoholo en ĝin verŝitaj.

Rapide mi prenis el la mano de l' belulino la trinkakvojn kaj revenigis la foriĝintan vivon.

Sed en mia koro estas ĉia soifo,  
Ke trinkado de akvo  
Ĝin ne kvietigas.  
Se eĉ tujajn marojn mi trinkadus,  
Benata estu la feliculo, kies rigardo  
Ĉiamaĉe falas sur ĉian vizaĝon.

Tradukita el la persa lingvo  
de E. Rebrik, Reĉti, Persujo.

## La senfina doloro.

Skizo.

Hodiaŭ, kiam mi plej ateente legis filozofian verkon, bruo farata de knaboj, ludantaj sur la strato, devigis min malfermi la fenestron de mia ĉambro kaj rigardi la armeon de bravaj batalantoj, t. e. malgrandaj petolaj pupoj, kiuj havas en siaj manoj grandajn lignajn glavojn. Ili ludas militon.

Trumpeto eksonas, kaj la estontaj batalistoj kurante kiel leporetoj, persekutataj de hundoj, amase marŝas por renkonti la malamikojn. Momente la ludado ŝajnas bela, sed kiam unu el la soldatoj, ano de la brava flanko, forprettas la flagon de la kontraŭuloj, la afero fariĝas terura. Oni aŭdas sonaradon de tamburaĉoj, trumpetadon, kriojn. Malproksime mi vidas najbarojn, kiuj ĝoje grimacas ĉe la pordego de siaj domoj, la patrinoj ridas, ridegas! Kaj mi min demandas. Kie estas la patroj de tiuj ĉi knaboj. Eble en la trinkejo, eble en la monludejo, eble... Abomeninda homaro! Ĉu ne sufiĉas la ekzemplo de vera milito? Ĉu ne sufiĉas terurega dramo de la sango, nek la funebra kantaĵo de la kanonoj? Ĉu neniam venos la tempo, en kiu vi komprenos, karaj patrinoj, ke estas maldece, permesi krimajn ludojn?

Eble ĝi ne venos... ĉar la infanoj, kiuj antaŭ momento ludis militon, nun ŝtonĵetas birdojn. La sento de amo estas forinta. Kaj kun la kubofoj sur la fenestro kaj la manoj sur la vizaĝo mi kaŝas la larmojn, kiuj malgraŭ miaj dudek kvin jaroj eliras el miaj okuloj. Mi pensas, ke eble la infanoj ofte vidis la drinkeman patron bati la patrinojn. Kaj mi timas — ho, Dio, — ke en la infanaj herboj loĝas iam la fiksa ideo, esti maturaj herboj por edziĝi kaj bati ankaŭ la edzinojn.

Ridu do kompatinda koro de mizero! Ludu, ludu! Ne estas via la tuta kulpo.

Originate D-ro Munyoung Ko,  
Heiannando, Koreo.

## Leteroj el mia muelejo.

(Fragmentoj).

De Alphonse Daudet.

### I. La sekreto de mastro Cornille.

Francel Mamaŭ, maljuna filofludisto, kiu venas de tempo al tempo pasigi la vesperon ĉe mi, trinkante boligitan vinon, rakontis al mi vilaĝan drameton, kies atestanto estis mia muelejo antaŭ dudek-kelke da jaroj. La rakonto de la simplanimulo min korusiis, kaj mi provos transdoni ĝin ĉi, kiam mi ĝin aŭdis.

(\*) Speco de provinca fluto.

La pli postaj futuristoj Moskvaj penis atingi la primitivan poeziarton per pure lingvaj rimedoj. Ĉi tiun „ŝvebant“ stilon — diras Faludi — oni povus karakterizi mallongigante ekzemple la frazon: „grandaj epidemioj furiozas“ per la resumiga vorto: „grefifu“. Tiamaniere oni detruas la sencan favore al la muzika efekte: Ankaŭ en tiu ĉi nova stilformo Majakovski estas la plej eminenta matadoro. Lia satira poemo „Ameriko“ mokas la teknikan potencon: „La ĉeffiguro de nia epoko estas Wilson. Kvintede harmoniigita el 5 mondpartoj, donis al li magian potencon. En Ameriko ne estas eĉ necese palpebrumi. Elektraj leviloj efektivigas tion.“

Krom la futuristaj poetoj sursceniĝis en 1918 la tiel nomata „grupo de Adamistoj“, gvidata de Gumilej kaj Godecki. Ĉi tiuj poetoj enamiĝis je la mondo de la objektoj. Se la amerikano Whitman la plej teruran homan haladon plisatis ol la plej gravajn mirindaĵojn de la tekniko, — la Adamistoj tion eĉ superas opiniantes trovi pli multe da belo en la fragmentoj de lavovezo ol en la plej poeziaj sonetoj de la mond-literaturo.

La plej novan „direkton“ literaturan enkondukis la t. n. „imagistoj“, la adeptoj de la teorio pri „senfadena fantazio“, ilia ĉefrepresentanto, Vadim Serŝenoviĉ, verkas ekskluzive per paraboloj. „Rakonto pri la okuloj de Lucij Kussikova“. La okuloj de tiuj sinjorino similas jen al akvario, en kiu „la ofiŝoj de la pupiloj malkviete celas la ombraĵon bordon de la okularoj“, — jen ili estas du cigaredoj ankoraŭ ne bruligitaj „en la cigaredujo de la okulakvaĵo“, — jen ili ekklamas „briligitaj kiel vakso“, — jen ili „haltas kiel fervojoj vagonaroj sur la stacio de la okula blankaĵo“. En ĉiu

Prezentu al vi por momento, karaj legantoj, ke vi sidas antaŭ kruĉo da vino agrable odoranta, kaj al vi parolas maljuna filofludisto:

Nia lando, mia bona sinjoro, ne ĉiam estis nia malviva kaj senfama loko, kia ĝi estas nun. lutepe tie ĉi fariĝis granda farunkomerc, kaj el rondo de dek mejloj homoj el la farmoj alportadis al nian grenon por mueligi... Ĉiuj monteroj ĉirkaŭ la vilaĝo estis kovritaj de ventmuelejoj. Dekstre kaj maldekstre oni vidis sole alojn, turniĝantajn per la blovo de mistralo super la pinoj, kaj longajn vicojn da malgrandaj azenoj, ŝargitaj per sakoj kaj paŝadantaj supren kaj malsupren laŭ la vojetoj; kaj dum la tuta semajno estis vera plezuro aŭdi sur la altaĵo la klakadon de vipoj, la krakadon de tolo kaj la Dia huel\*) de muelisthelpantoj... Dimanĉe ni iradis grandare al la muelejoj. Tie supre la muelistoj regalas nin per muskatvino. La muelistinoj estis belaj kiel reĝinoj, kun siaj puntaj koltukoj kaj oraj kruĉetoj. Mi kunprenadis mian fliron, kaj ĝis nigra nokto oni dancadis farandolajn. La muelejoj faris ja la ĝojon kaj riĉecon de nia lando.

Malfeliĉe francoj el Paris konstruis sur la Tarasona vojo grandan vapormuelejon. Estis bele, estis nove! Niaj homoj baldaŭ kutimiĝis sendi sian tritikon al la vapormuelejo, — kaj la kompatindaj ventmuelejoj restis sen laboro. Dum tom da tempo ili provis konkuri, sed la vaporo montriĝis pli forta, kaj unu post alia ili ĉiuj estis devigitaj ĉesigi la komeron... Oni ne vidis plu la venantajn azenetojn... La belaj muelistinoj forvendis siajn orajn kruĉojn... Nenia muskatvino! nenia farandolo!... La mistralo blovis laŭ sia plaĉo, — la aloj restis senmovaj... Poste la komunumo decidis forigi la kadukiĝintajn konstruaĵojn, kaj anstataŭe oni plantis vitojn kaj olivarbojn.

Tamen, meze de tiu disfalo, unu muelejo restis kaj kurage daŭrigis ĵurni siajn alojn sur la monieto, najbare de la vapormuelejo. Ĝi estis la muelejo de mastro Cornille, — la sama, en kiu ĉi-momente ni pasigas la vesperon.

Mastro Cornille estis maljuna muelisto, dum sesdek jaroj sin okupanta pri faruno kaj pasie korligitata al sia metio. La instalo de la vapormuelejo kvazaŭ senprudentiĝis lin. Dum tuta semajno oni vidis lin kuranta tra la vilaĝo kaj kriadanta tuforte, ke oni intencas venenigi la tutan Provincon per la „vaporfurono“. „Ne iru tien, li diris; tiuj rabistoj, por fari panon, uzas vaporon, kiu estas elpenŝejo de diablo, dum mi laboras kun la mistralo kaj la framontano\*, kiuj estas spirado de la bona Dio“. Kaj li trovis multe da belaj vortoj por laŭdegi la ventmuelejojn, — sed neniu lin aŭskultis.

Tiam la furtoza maljunulo enfermiĝis en sia muelejo kaj vivis tute sola, kvazaŭ sovaĝa besto. Li eĉ ne volis plu restigi ĉe si sian nepinon Vivette, dek kvin-jaran knabinon, kiu deposedis la morto de siaj gepatroj havis nenian protektanton en la mondo krom sia avo. La kompatinda junulino estis devigata perlabori la vivon, sin dungiante en la farmoj por grenrikoltoj, kulturo de silkraŭpoj aŭ olivoj. Tamen la avo ŝajnis tre ami la knabinon. Ofte li faris piede kvar mejlan vojon por viziti ŝin en iu farmo, kie ŝi laboris,

\*) Ekkrio de francaj venaristoj por instigi la ĉevalojn k. a.

\*\*) Suda kaj norda vento en provinco.

poemo Serŝenoviĉ donas detalajn priskribojn de siaj teoriaj principoj. Jen kelkaj titoloj de liaj poemoj: „Principo de la impresionismo“, „Konstruktio de la liriko“, „Enhavo minus formo“ ktp.

Zanoni.

## Humoro.

### El mia biografio.

Mi ne ŝatas mian nomon — Bibabo, sed mi decidis paciencie subporti ĉiujn mokojn kaj errarajn supozojn. Ĉu mi estas kulpa, ke tute hazarde mia nomo aspektas kiel Esperantigita substianto? Kial oni suspektas mian nomon esti pseŭda, dum ja ekzistas similaj Esperantoidaj nomoj de aliaj honorindaj samideanoj. Ekz. s-o S. en Riga, s-o B. en Mosstar, del. UEA, aliaj s-oj delegitaj en Antibes, Cordoba, Groningen, Huesca, Vladivostok, kaj alioke.

Mi naskiĝis en Andoro, unua en la mondo regno — laŭ la malgrandeco de loĝantaro. Mia avo estis almiranta el hispana urbo Bilbao, kies nomo pro ĉu eraro kripligis kaj ekestis mia familia nomo.

Mia baptonomo estas Paris, do mia nomfesto okazas la 5-an de aŭgusto, se ĝi okazas. Laŭ profesio mi estas barbiro por sinjorinoj, pardonu... ne barbiro, ĉar sinjorinoj ja ne havas barbon (krom en malofteĝaj esceptaj okazoj). Ĉar mi ŝatas novajn esprimojn, mi diros simple, ke mi estas „damfrizisto“. Kompreneble, ne en Andoro, kie mankas „damoj“, t. e. sinjorinoj kaj fraŭlinoj, ĉar nia modesta respubliko havas nur virinojn kaj knabinojn, krom la virseksaj regnantoj. Mi loĝas en Barcelono, kie mi laboras kiel submajsiro en la strato de Sankta Antonio.

kaj kiam li estis ĉe ŝi, li pagisigis tutajn horojn ŝin rigardante kaj plorante.

Oni opiniis en la lando, ke la maljuna muelisto forsendante Vivette-on, agis pro avareco; lia reputacio ne altiĝis pro la fakto ke tiamaniere li lasis vagadi sian nepinon de unu farmo al alia, ŝin elmetante al la bruteco de farmolaboristoj kaj al ĉiuspecaj suferoj de dungata junulino. Oni malŝatis ankaŭ, ke honorinda homo, kia estis mastro Cornille kaj kiu ĝis tiam ĝuis respekton, vagadis nun en la stratoj kiel vera cigano, nudpiede, kun fruita ĉapo kaj disŝirita jakko... Estas fakto, ke dimanĉe, kiam ni vidis lin eniranta al la meso, ni hontis pro li, — kaj Cornille tion sentis tiel bone, ke li ne kuraĝis sidigi sur la benko de monofrantaj parohanoj, — ĉiam li restis en la fundo de l' preĝejo, apud la sanktakuvo, kun malriĉuloj.

En la vivmaniero de mastro Cornille estis io neklara. Jam deposi longa tempo neniu el la vilaĝo portadis al li grenon, tamen la aloj de lia muelejo ĉiam turniĝadis kiel ĝis nun... Vespere oni renkontadis sur la vojoj la maljunan mueliston pelanta antaŭ si azenon, ŝarĝitan per grandaj farunŝakoj.

„Bonan vesperon, mastro Cornille!“ kriis al li la vilaĝano, „do ĝi ankoraŭ funkcias la muelejo?“

„Ĉiam, infanoj miaj“, respondis la maljunulo viglato. „Dank' al Dio, laboro ne mankas al ni.“

Demandite, de kie, pro la diablo, venas tiom da laboro, li metis fingron sur la lipojn kaj respondis mistere: „Motus!“ mi laboras por eksportio... Neniam oni sukcesis ekscii de li ion plian.

Sovi sian nazon en lian muelejon pri tio oni ne povis eĉ revii. Eĉ la malgranda Vivette neniam eniris tien...

Preterpasante, oni vidis la pordon ĉiam fermita, la grandajn aloj ĉiam moviĝantaj, la maljunan azenon sin paŝtanta sur la herbejo, kaj grandan malgrasan katon, kiu ĝuis la sunon sur la fenestrorando kaj rigardis la preterpasantojn kun malica mieno.

Ĉio ĉi havis misteran aspekton kaj igis la homojn multe babilii. Ĉiu klarigis la sekretojn de mastro Cornille laŭ sia maniero, sed la ĝenerala famo estis, ke en la muelejo sin trovas eĉ pli multe da sakoj kun argenteoneroj ol da farunŝakoj.

Tamen iom poste ĉio malkovriĝis; jen kiamaniere:

Dancigante la gejunularon per mia filfo, mi rimarkis unu belan tagan, ke mia plaĝa filo kaj la eta Vivette enamigis unu je alia. Fundanime mi ne koleras pro tio, ĉare spite ĉio la nomo de Cornille estis respektata ĉe ni, kaj krom tio mi plezure vidus la beletan malgrandan paseron Vivette troteji en mia domo. Sole, ĉar niaj geamantoj havis oftan okazon esti kune, mi volis, pro timo je ia malbonaĵo, tuj ordigi la aferon; fial mi supreniris al la muelejo, por diri du vortojn pri tio al la avo... Ha! la maljuna sorĉisto! Vi devus vidi, kiamaniere li min akceptis! Estis neeble igi lin malfermi la pordon. Mi klarigis al li, kiom mi povis, miajn intencojn tra la serurtruo, — kaj dum mi parolis, la tutan tempon tiu fripono, la kato, blovspiregis super mia kapo.

Interjekcio por silentigi pri iu afero.

Mi fariĝis Esperantisto en 1909, kiam okazis la Kvina Kongreso en mia urbo. Tiam venis nian butikon tri „damoj“ parolantaj nekonatan por mi lingvaĵon. Kiam mi ekkonis, ke ĝi estas Esperanto, mi tuj ĝin eksŝatis, precipe pro ĝia regulo, ke ĉiuj substantivoj finiĝas je -o.

Poste mi aliĝis al UEA, estis ano de nia loka grupo „Nova Sento“, havis konton en la Ĉek-banko Esperantista, ho ve, malaperinta kune kun miaj tridek spemiloj. Nun mi intencas aliĝi al ELA, kaj, kun tiu intenco, mi komencis verkadi. Mia unua poemo estas „Versa Aboco“, kiu eble aperos en nia ŝatata ET.

Krome mi intencas prezenti kiel kandidato por nia LK; por tiu celo mi verkas „Intiman Vortaron“, kiu servos al samideanoj dezirantaj paroli puran Esperanton, estante absolute nekomprenebla por iuj ajn neesperantistoj. Bonega ideo! Ĉu ne? Jen kiel povas soni tiu „intima lingvo“: *Malacn antaŭvesperon, malsinjorino! Ĉu ĉij emas amuziri malsen mi? (Bonan tagon, sinjoro! Ĉu vi deziras promeni kun mi?) Sed tiu vortaro ne estas facila por verki... Mi devas streĉi tutan mian imagon. Kaj fine mi ŝanceliĝas inter elektindaj vortoj. Ekz por „traduki“ vorton ĉielo mi elpensis plurajn kunmetaĵojn: maltero, anĝel-efo, sunirejo, arkajego, bluarko, pluvdonacejo, supermubaĵo... Kion elektii? Kion preferi? Kion preferi el inter ĉiuj bonegaj elpensajoj? Mi estas avarema por miaj trezoroj, mi dezirus ilin ĉiujn gadi en la vortaro! Kiam aperos mia «Intima Vortaro», mi organizos miajn adeptojn en «Intiman Ligon Internacian» — Ili! Kaj ili havos sian revuon, siajn fakajn kunsidojn ĉe la Dekkvina, la Deksesa, ktp.*

La maljunulo ne donis al mi tempon por fini kaj kriis al mi tre malĝentile, ke mi reiru al mia fluto; se urĝas edziĝi mian filon, mi serĉu knabinojn en la vapormuelejo... Kredu, ke mia sango ekholis, kiam mi aŭdis tiajn malicajn vortojn, — tamen mi havis sufiĉe da prudento, por min ekregi, kaj, lasinte la maljunan fanatikulon en lia muelejo, mi revenis al la infanoj, por anonci al ili mian malsukceson... La kompatindaj ŝafidetoj ne volis kredi min; ili petis, kiel plej grandan favoron, mian permeson, ke ili ambaŭ kune povu supreniri al la muelejo por paroli kun la avo... Mi ne kuraĝis rifuzi, kaj... prrr! jen miaj geamantoj estis for.

Kiam ili alvenis supre, mastro Cornille estis ĵus foririnta. La pordo estis ŝlosita je duobla turno; sed forirante, la maljunulo restigis sian ŝtupetaron ekstere, kaj tuj al la infanoj venis la penso eniri tra la fenestro, por rigardi, kio estas en la muelejo...

Siranga afero! La ĉambro estis malplena: eĉ ne unu sako, eĉ ne unu ĝrajno da tritiko, neniu ereto de fanono sur la muroj, aŭ sur la aranejoj... Oni eĉ ne flaris la agrablan varman odoron de dispremita tritiko, kiu ordinare parfumas la muelejojn... La aksostango estis polvokovrita, kaj la malgrasa katego dormis sur ĝi.

La malsupra ĉambro havis same mizeran kaj malzorgatan aspekton: malbona litaĉo, kelkaj ĉifonajoj, peco da pano sur unu ŝtupo de la ŝtuparo kaj en unu angulo — tri aŭ kvar fruitaj sakoj, el kiuj ŝutiĝis gipsoruboj kaj blanka tero!...

Jen kia estis la sekreto de mastro Cornille! Tiujn rubaĵojn li veturigadis vespere laŭ la vojoj, por savi la honoron de sia muelejo kaj kredigi, ke oni faras en ĝi farunon... Kompatinda muelejo! Kompatinda mastro Cornille!... Jam delonge la vapormuelistoj senigis ilin je ĉia vera laboro. La aloj ĉiam moviĝadis, sed la muelŝtono turniĝis sur nenio...

La infanoj revenis plorante kaj rakontis al mi, kion ili estis vidintaj. Mia koro preskaŭ rompiĝis, kiam mi ilin aŭskultis. Ne perdante eĉ unu minuton, mi tuj kuris al la najbaroj, resume rakontis al ili la aferon, — kaj ni interkonsentis, tuj porti al la muelejo de mastro Cornille la tutan grenon, troveblan en la domoj. Ĵus dirite, tuj farite. La tuta vilaĝo ekvojiĝas, kaj ni alvenas supre procesie kun azenoj, ŝarĝitaj per greno — per vera greno tiu-ĉi-foje!...

La muelejo estis larĝe malfermita... Antaŭ la pordo mastro Cornille, sidante sur sako kun ruboj, ploris kun sia vizaĝo en la manoj. Reveninte hejmen, li tuj rimarkis, ke dum lia foresto oni enpeneris en la muelejon kaj malkovris lian malĝajan sekreton.

„Ho, mi mizera!“ li diris. „Nun restas por mi nenio alia ol morti... La muelejo estas malhonorigita!“

Kaj li ĝemloris ĝis korrumpo, nomante sian muelejon per ĉiuspecaj nomoj, kvazaŭ parolante al efektiva persono.

Tiumomente la azenoj alvenas, kaj ni ĉiuj komencas krii tre laŭte, kiel en la bela tempo de la ventomuelistoj:

„Ohe, la muelejo!... Ohe, mastro Cornille!“

Kaj jen sakoj amasiĝas antaŭ la pordo, kaj bela flavruĝa greno disŝutiĝas teren ĉiuflanke...

Nun, pardonu, ke mi devas halti kaj prokrasti mian babiladon ĝis la sekvanta monato, ĉar mi havas urĝan laboron, nome prepari rozodoran akvon por polverigilo, el rozoleo, la sekreta procedo de mia mastro. El unu gramo da rozoleo — cent litroj da rozparfuma akvo. Do, estimataj legintoj, ĝis la revido!

P. Bibabo.

**La Socialisto**

de Taraĉ Huŝca.

(El rakontoj de vilaĝano).

— Estas ridinde kaj ankaŭ malfeliĉo. „Malsatulo pensas pri pano“ (tiel oni diras ĉe ni). Ni vilaĝanoj aŭskultis kion oni diris pri la tero. Ekaperis ĉe ni taj longaj paperetoj presitaj — „proklamaĵoj“. Ni ilin legis, tralegadis. Ili al mi treege plaĉis, tiel, ke ankoraŭ nun unu fia proklamaĵo kuŝas ĉe mi, bejme, apud la sankta bildo.

Mi demandadis, kie oni povas ilin ricevi? — „En la urbeton“ — oni respondis.

Mi alveturis urbeton. Mi vizitis unu lokon, alian. Mi iras sur la bazarplacon kaj demandas: „Ĉu vi ne scias, fraĵoj, kie oni vendas proklamaĵojn?“

„Demandu“, diras ia trompenulo, „la gardiston“.

Mi, kiel malsaĝulo efektive demandis lin:

„Diru, fraĵoj, kie oni povas ricevi proklamaĵojn?“

„Tuj mi montrus al vi“, diras la gardisto: „iru nur kun mi“.

„Frapadu kaj oni malfermos al vi“, mi ekmemoris la vortojn de nia popo (pastro).

Mastro Cornille larĝe malfermis la okulojn. Li prenis la grenon en sian maljunan manplaton kaj diris, ridante kaj plorante samtempe:

„Estas greno!... Sinjoro Dio!... Bona greno!... Lasu min ĝin rigardi!“

Poste, sin turnante al ni:

„Ha, mi bone sciis, ke vi revenos al mi... Ĉiuj tiuj vapormuelistoj estas ŝtelistoj!...“

Ni volis triumfe porti lin en la vilaĝon.

„Ne, ne, infanoj miaj; antaŭ ĉio mi devas doni al mia muelejo iom por manĝi... Pripensu! dum tiom longa tempo ĝi ricevis nenion inter siajn dentojn!“

Kaj ni ĉiuj havis larmojn en la okuloj, vidante la kompatindan maljunan klopodanta dekstren kaj maldekstren, malpleniganta la sakojn, kontrolanta la mueladon, dum la greno dispremiĝadis kaj la delikata triukpolvo suprenflugis al la plafono.

Oni devas juste juĝi pri ni: de tiu tago ni neniam lasis la maljunan mueliston sen laboro. Poste, unu matenon, mastro Cornille mortis, kaj la aloj de nia lasta ventumuelejo ĉesis turniĝi, ĉi-foje por ĉiam... Post la morto de Cornille neniu prenis lian oficon. Kion vi volas, sinjoro?... Ĉio en tiu ĉi mondo havas sian finon, kaj oni devas opini, ke la tempo de l' ventumuelejo forpasis, same kiel la tempo de l' trapasigaj boatoj sur la rivero Rhône, de parlamentoj kaj de jakoj kun grandaj floroj.

El la franca lingvo tradukis D-ro Andreo Fiŝer, L. K. K. Tiflis.

**Izoleco.**

Palpebrumas la ŝtetoj  
Min karesas freŝa vento  
Sed pro mondo izolita  
Premas min maldolĉa sento.

Pensas mi, ke en ĉielo  
Multajn vidas mi ŝtetojn  
Sed la unuj al aliaj  
Povas sendi nur fajretojn.

La maljunaj rakontuloj  
Ĉirkaŭ mi betuloj staras,  
Rakontadas la fabelojn  
Per la branĉoj signojn faras.

Kaj eterne rakontadas  
La betulo al alia,  
Sed alia ne aŭskultas  
Pri fabela mondo ĝia.

Ĉar ĝi ankaŭ rakontadas  
Kaj bruetas per branĉetoj,  
Kaj rigardas en ĉielon  
Kie brilas la ŝtetoj.

Kampaj floroj, floroj belaj  
Klinas, klinas la kapetojn  
Morgaŭ gaja infanaro  
Faros faskojn kaj kronetojn.

Versas larmojn, larmojn-rosojn  
Plendos floro al alia,  
Sed alia ne atentis,  
Pri doloro plendas ŝia.

Kantas homo belajn kantojn,  
Sed neniu lin subtenas,  
Li eldiras flaman vortojn,  
Sed neniu lin komprenas.

Lin la unuj ne komprenas,  
Ne aŭskultas la aliaj,  
Ili pensas pri la vivo,  
Izolitaj vivoj siaj.

Palpebrumas la ŝtetoj  
Min karesas freŝa vento,  
Sed pro mondo izolita  
Premas min maldolĉa sento.

Nova Kin, Smolensk.

Kiam ni alproksimiĝis al la kancelario de l' komisaro, mi jam supozis, ke oni min kaptos, kiel vulpon en kaptulo.

Venas la komisaro.

„Jen! Bona speco de burĝo vi estas! Vi sentaŭgulo! Vi malkaŝe disportas proklamaĵojn? Ne kredebla impertinenteco. Oni enkarcerigu lin!“

Tutan semajnon mi sidis ĉe la komisarejo, kaj poste oni min forkondukis urban malliberejon. Jen mi ekkonis malĝojon: Eĉ pedikoj ekloĝiĝis sur mi...

Post tri monatoj oni min liberigis, oni mokis pri mia malsaĝeco dum la esplordemandado. Sed mi diris nur veron.

„He vi, socialisto“, oni diris, „demokrato vi sencerbal!“

„Moku mi, pensis, nun mi ne estas plu fia stultulo! La malliberejo min iom klerigis: multe da saĝaj homoj sidis tie.“

En la malliberejo mi lernis kanti diversajn kantojn.

Kiam nun foje mi fariĝas malĝoja, mi kantas ilin, kaj ekmemoras la malliberejon.

El blankrusa lingvo tradukis La Malfeliĉa.

**Nenece.**

„Kien vi iras, Karlo?“

„E... en la ler... ne... ejon po... por ba... bal... bu... bu... tuloj.“

„Ho, neniel necese, vi ja povas tion jam perfekte.“